

[noto] fonto: "La Lumo Orienta", Jaro 2:N-ro 2-3, 1932

La Senmezura Lumo
el la "Laŭdo al Budaŭo Amitabo" de Sankta Ŝinran

浄土和讃抄訳

verkis **Sinran** 親鸞

trad. **T. Jamaguĉi**

Dek Kalpoj de temp' jam forpasis de kiam
Li estis Buda' Amitab' fariĝinta,
Ja kies Darma'-personeco senlima
Lumigas l' abismon de Kosmo la blinda.

La Lumo de l' Saĝo de li, senmezura!
Ja ekster l' atingo de l' Lumo Mistera
Neniu estaĵo en Kosmo ekzistas.
Rifuĝon, do, prenu en Lumo la Vera!

Senlime ja brilas la Lum' liberiga!
Kaj ĉiu estaĵ' en ban' ties egala
Sen dub' liberiĝas el mondaj katenoj.
Rufuĝu en Lumo la Unversala!

La Gloro la Lia penetras tra ĉio.
Barite nenom ja Tiu Etera
Favoras la tutan vivantan aĵaron.
Rifuĝon, do, prenu en Tiu Mistera!

Radioj la puraj de Li senkomparaj!
Saviĝas el karmo-jugaro la tuta,
Ja ĉiu ĝuanto de tiu ĉi Lumo.
Rifuĝon, do, prenu en Fort' l' Absoluta!

Ĉar Lia Lumgloro superas ja ĉion,
Lin oni alnomas Buda' Radianta.
Mallumon Tri-Mondan forigas Li Brila.
Rufuĝon, do, en Li arĥato la Granda!